

Pete Seeger,

Kelka floro, kie ĝi

tradukita de Manfred Retzlaff

Kelka floro, kie ĝi
estas nur restinta?
Kie estas ĝi, ĉu vi
tion scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Inoj plukis tiujn ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

Kelka ino, kie ŝi
Estas nur restinta?
Kie estas ŝi, ĉu vi
Tion scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Viroj prenis tiujn ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

Kelka viro, kie li
estas nur restinta?
Kie estas li, ĉu vi
tion scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Soldatiĝis tiuj ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

La soldatoj, kiujn mi
vidis militiri,
kie estas tiuj ĉi?
Ĉu vi scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Entombiĝis tiuj ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

...

Kie la tombejoj ĉi
estas sur la tero?
Kie estas tiuj ĉi?
Ĉu vi scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Plorkovritas ĉiuj ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

*Traduko de la Angla poemo "Where have all the flowers gone?" de Pete Seeger en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-05-13.*

MR-150-1 / Arg-722-1453 (2012-12-11 19:22:11)

Mi, Manfred Retzlaff, verkis tiun ĉi tradukon laŭ la germanigo de Max Colpet. Pri tiu rigardu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Max_Colpet.